

ĈU JOGO ESTAS NURA EKZERCADO?

Sankta Johano Paŭlo Dua diris: „Iuj kristanoj entuziasme bonvenigas certajn aferojn, kiuj eliras el religiaj tradicioj de Malproksima Oriento, ekzemple iujn teknikojn kaj metodojn de meditado kaj asketado. En iuj medioj ili iĝis ia modo kaj estas akceptataj grandparte nekritike.“ (Transpaŝi sojlon de espero).

Tiuj ĉi vortoj de la sankta Johano Paŭlo la Dua estas nuntempe speciale aktualaj. Nuntempe estas unu el la plej popularaj versioj rilaksiĝo pere de la plej diversaj gimnastikadoj de jogo. Ili ne plu limigas sin je konstante pli ofte ekestantaj „instruejoj de jogo“, sed ili ankaŭ eniras publikajn spacojn – jogon oni praktikas en parkoj, ĝi estas uzata en lernejoj intruhoroj, en konsultejoj por gravedulinoj, en kluboj de senioroj ...

Ĉu nura gimnastikado?

Ofte eĉ praktikantaj katolikoj lasas sin allogi per ondo de „bonfara forto“ de jogo kun argumentado, ke ja por ili tio estas nuraj rilaksiĝaj korpaj gimnastikoj kaj ili ne kunigas ilin kun difinita filozofio. Ĉu tio vere estas ebla?


Respondon al tiu ĉi demando ni povas trovi en Katekismo de la Katolika Eklezio, kiu emfazas: „Estas do erare opinii moralon de la homaĝoj nur laŭ intenco, kiu instigas ilin, aŭ nur laŭ cirkonstancoj (medio, socia impetego, truddevigado aŭ neceso agi ktp.), kiuj formas ĝian kadron.“ (KKE 1756) Konfirmon de tio ĉi oni ankaŭ trovas en vortoj de la sankta Paŭlo: „Detenu vin de ĉia formo de malbono“ (1 Tes 5,22)

Multaj tiuj, kiuj studas aŭ esploras orientajn kulturojn, atentis, ke jogo estas esence mergita en mondo de dioj kaj spiritoj kaj ĝi baziĝas je ilia alvoko al ĉestado (kio povas alkonduki al obsedo), kaj apartaj korpaj pozicioj estas sanktigataj al diversaj idoloj. Gestoj kaj ekzercado en jogo do ne povas esti spirite neŭtralaj. Ili kondukas al tio, ke se ni ekzercas jogon, ni malfermiĝas (eĉ se senkonscie) al efikado de malbonaj spiritoj kaj ni estas entrenitaj en certan version de idoladorado (vidu Eli 23,24).

En kio konsistas jogo?

Patro Joseph-Marie Verlinde – katolika sacerdoto – kiel juna sciencisto kun plej bonaj dispozicioj perdis kredon. En ondo de populareco de filozofio de Oriento li ekinteresiĝis pri jogo kaj meditado. Li interkonatiĝis kun tiama guruo de transcendentala meditado – Maharishi Mahesh Yogi, li travivis kelkajn jarojn en himalajaj „aŝramoj“¹, li estis lia lernanto. Tie li profundigis siajn konojn de la orienta filozofio kaj tie ankaŭ okazis lia konvertiĝo. En siaj atestadoj patro Verlinde sciigas, en kio precize baziĝas praktikado de jogo. Li diras, ke la celo de jogo baziĝas en tio, ke ni portu teran energion en nia korpo ĝis supro de la kapo – ĉar kiam kuniĝas la tera energio kun la energio kosma, tiam malaperas „iluzio de individuo“. Patro Verlinde emfazas, ke ekzistas diversaj specoj de jogo, sed ĉiuj havas la saman celon.

Ekzemple celo de hatajogo (ĝi sin apogas je fizika ekzercado) estas tio, ke per



korpozicioj ĝi kaŭzu, ke tiu korpenedio leviĝu supren.

Kio estas tiu energio?

Estas tio neniam el konataj fizikaj energioj: Ĝi estas energio okultisma – do tia, kiu estas nek mezurebla, nek pesebla. Tiu „energio“ estas nomata *kundalini* kaj ĝi estas bildigata kiel serpenteto (komp. Gen 3,1). Ĝi devas trairi de komenco de spino ĝis supro de la kapo. Ĉar bazo estas komenco de spino, tial do ekzercado de jogo estas praktikata sidante en pozicio de lotosfloro.

Tra kie precize devas tiu energio trapasi?

Ĝi devas leviĝi tra okultismaj kanaloj – do tra tiuj, kiuj ne apartenas al nia fizika korpo. Laŭ orienta kredo ni havas tri tiajn kanalojn, kiuj sepfoje sin trapenetas. Cetere tiuj punktoj de trapenetado estas interesaj, ĉar tie troviĝas ĉakroj – tiaj kvazaŭaj energetikaj pumpiloj, kiuj devas elsendi energion (kundalini) supren.

Por faciligi tion, jogo rekomendas krom fizika ekzercado ankaŭ ekzercadon spiran – *pranyama*. Ilia celo estas tute la sama – helpi suprenlevi tiun energion. Kiel tion fari? Ekzemple helpe de precizaj spirteknikoj ni nin aldirektas en staton, en kiu ĝi estas puŝata supren.

Tria versio de jogo koncernas teknikojn de koncentriĝo. Ili baziĝas je enmensa ripetado de mantroj, kiuj estas vortoj speciale elektitaj tiamaniere, ke ili elvoku eĥon ĝuste en tiuj kvazaŭ energetikaj pumpiloj (ĉakroj).

Ni do povas observi, ke jogo koncentriĝas ĉirkaŭ ĉakroj. Korpomovoj, spiro, koncentriĝo – tio ĉio servas al tio, ke la ĉakroj ekmoviĝu. Ĉio celas al tio, por ke la energio (kundalini) estu alkondukita al kapsupro, ĉar kiam tio okazas, la persona mio malaperas kaj aperas sento de unuiĝo kun ĉio.

Se ni ĉion ĉi tion scias, pli facile ni ekkomprenas tion, kion priskribas Grzegorz Fels kaj en la libro *Niebezpieczna joga* (Dangera jogo) li klarigas: „Iuj konfesuloj

de jogo asertas, ke en ĝia praktikado ili vidas nenion malbonan, ĉar ili rifuzas ĉiun filozofion, kiu malantaŭ ĉi tio staras. Tiel komprenatan jupon ili akceptas kiel certan manieron de ekzercaro, servanta al rilaksiĝo. Kiam ili pri tio demandis iun hindan joganon, kun rideto li respondis: »Ili ekzercu. Ĉakroj eĉ tiel malfermiĝos al ili.« Propagandistoj de jogo atestas tute klare, ke filozofio kaj praktiko estas nedisigeblaj.« (*Niebezpieczna joga*, p. 31-32)

Ĉu proksimigas nin ekzercado de jogo al Dio?

Neniam! Iu homo, kies jogo alkondukis al grava demoneca dependeco diris: „Mi estas konvinkita, ke jogo estas sataneca. Kiu ĝin praktikas, malfermas sin mem al demono efikado.“

Kardinalo Joseph Ratzinger emfazas, ke „karakteriza trajto de la mistiko de tiu ĉi maniero (de jogano) estas eperto de identeco: mistikulo estas dronanta sin en oceano de »absoluta unueco« (...). Sur lasta ŝtupo de tiu ĉi ĝuo la mistikulo ne diros al sia Dio: »Mi estas Via«, sed lia formulo sonus: »Mi estas Vi«“ Bedaŭrinde, tio estas la plej malbona formo de idoladorado, kiun satano proponas en la komenco mem: „vi estos kiel Dio.“ (Gen 3,5) Perpleksiga estas tio, ke biblia teksto tiuloke identigas satanon kun serpento.

Patro J-M. Verlinde ofte antaŭ jogo avertas: „Rezultoj de la okcidenta kaj orienta mistiko estas tute antagonistaj. Tio ne estas diferencaj vojoj kondukantaj al sama supraĵo, tio estas atingo de tute malaj pintoj: pinto de humileco kaj pinto de fiereco! Unuj alvenas al Vero, aliaj al iluzio.“ Pinto de fiereco estas absoluta egoismo, alivorte infero. Pinto de humileco estas absoluta amo, alivorte ĉielo.

Atesto de Paŭlo

Ekzistas multaj atestoj de homoj, kiuj travivis destruktivan efikadon de jogo. Jen unu el ili:

„Mi memoras pri ferioj, kiam mi iris al

bloko de individuaj ekzercoj de jogo. Post instruado mi sentis min fizike ruinigita, komencis aperadi pensaĵoj, de kiuj mi ne sukcesis min liberigi, negativaj pensaĵoj rilate al mi mem. (...) Mi ĉesis preĝi, mi estis konvinkita, ke mi mem kapablas ĉion solvi kaj la problemojn mi sukcesos solvi per vekiginta interna forto. (...) Jogo min alkondukis al interna kraŝo, al rifuzo de tio, kio antaŭe kaŭzadis al mi ĝojon, fine ĝis terura soleco. Mi iĝis izolulo, egoisto maksimume koncentrita je mia korpo kaj je mia pensado kiel perilo, kiu influas mian korpon kaj proprajn emociojn. Mi ne kalkulis kun volo de Dio, kun Lia intenco por mia vivo. La animo estis ie forgesita. Ĉiam pli ofte mi eniĝadis en spiritualecon de hinduismo. Kiel kristanon ĝi min ĉiam pli kripligis kaj min malproksimigis de la propra natureco. Ŝanĝo de dieto kaŭzis detruon de organismo, pardon de pezo kaj grandan koncentriĝon je salubra nutraĵo. Mi ekkomprenis, ke mi sklaviĝis. Mi ne povas fari tion, kion mi volas, eĉ se temas pri tiel principaj homaj bezonoj, kiel estas nutraĵo. Ke mi ne havas eblon de ĝia libera elekto. Iun tagon post ekzercado de jogo mi senkonsciigis. Komencis fizikaj problemoj, sanproblemoj de neurologia deveno. Laŭ kuracista esploro ĉio estis en ordo, sed mi mem sentis min ĉiam pli malbone. (...) Jogo estas filozofia sistemo, ĝia praktikado kuniĝas kun akcepto de hinduisma doktrino. Nune mi jam scias tion, kio al mi ne estis dirita dum la instruado – ke en sanskrita ripetado de mantro povas esti nomoj de hinduisma diaro aŭ spiritoj. (...) Jogo ne estas korpa ekzercado. Ĝi estas spirita afero, kiu alkondukis min al grandega fizika kaj spirita sufero, forkondukis min de miaj konatuloj kaj de tio, kio iam kaŭzadis al mi veran ĝojon.“ (Niebezpieczna joga, p. 16-18)

Sac. D-ro hab. Aleksander Posacki tion eksplikas tiel, ke pere de praktikado de jogo homo „paŝon post paŝo profundigas sin en sian internon kaj konekse kun tio ne plu estas kapabla ekligi kontaktojn kun aliuloj. Sekve tiun ĉi staton de senpersoniĝo li ak-

ceptas kiel ĝustan kaj bonan. Tio kolizias kun alvokiĝo de la homo por bonfarado kaj servo de la amo.“ (*samloke*, p. 66)



Resumo

Jogo estas sistemo de ekzercado, kiu eliĝas el religia mondkoncepto, en kiu ne estas loko por persona Dio. Celo de tiuj ekzercadoj estas mobilizado de la okultisma energio (ne hazarde identigata kun serpento), perdo de propra mio, kio povas konduki al demoneca sklavigo.

Ni devas klarigi al si, ke homo mem ne povas por si akiri savon – ĝi estas donaco, kiun ni ricevas. Dio do, kiu nin sopiras pridonaci per pleneco de la feliĉo, nin tiel amegas, „ke Li donis Sian solenskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al Li, ne pereu, sed havu eternan vivon.“ (Joh 3,16) Dum ĉiu provo atingi savon de si mem estas rifuzo de donaco de Dia mizerikordo kaj malfermado al efikado de la malbonaj spiritoj.

Danke al ofero de Kristo ni povas kuniĝi kun Li kaj pleniĝi per Lia Spirito: „Aŭ ĉu vi ne scias, ke via korpo estas templo de la Sankta Spirito, kiu estas en vi kaj kiun vi havas de Dio? kaj vi ne apartenas al vi mem, ĉar vi estas aĉetitaj per prezo; glori do Dion en via korpo,“ (1 Kor 6,19-20)

Verdire funkciigo de la okultisma energio en nia korpo ne estas glorigo de Dio en nia korpo! Estas tio peko kontraŭ la unua Dia ordono.

Kion fari?

Kia do estas la plej bona renkontiĝo kun Dio? Kiel puriĝi kaj malproksimiĝi de ĉiutagaj problemoj?

Sankta Johano Paŭlo la Dua nin instigas al laŭeble plej ofta akceptado de Kristo en la sankta komunio kaj lian adoradon en la Plejsankta Sakramento: „Estas bela intime interparoli kun Li, kuŝi sur Lia brusto kiel amata disĉiplo (komp. Joh 13,25) kaj lasi sin penetri per senlima amo de Lia Koro. Se devas la kristaneco en nia tempo identiĝi ĉefe per »scipovo de preĝo«, kiel ne senti novan bezonon persisti longe en spirita interparolo, en trankvila adorado, en teniĝo de la amo antaŭ Kristo ĉeestanta en la Plejsankta Sakramento? Multfoje mi, amataj gefratoj, faris tiun sperton kaj ĉerpis el ĝi forton, konsolon kaj helpon!“ (*Ecclesia de Eucharistia*, 25)

Beata Patrino Tezeza el Kalkuto ĉi tie emfazas: „Ni devas konstrui nian vivon sur

Eŭkaristio, rigardi Tiun, kiu estas Lumo. Viaj koroj restadu ĉe Lia Dia Koro. Petu Lin pri graco, ke vi povu Lin ekkonadi, pri graco Lin ami, pri kuraĝo al Li servi. Senlace Lin serĉu. Pere de Maria, Kaŭzo de nia ĝojo, vi malkovros, ke nenie en la mondo vi estas pli bone akceptataj, pli multe amataj ol de Jesuo vivanta kaj vere ĉeestanta en la Plejsankta Sakramento. Li estas ĉi tie vere, en propra Persono, kaj atendas vin.”

Ni nemoru do, ke la plej bona maniero de la renkontiĝo kun Dio, nura Fonto de la ĝojo, amo kaj paco, estas Eŭkaristio – ni eluzadu ĝin laŭeble plej ofte, kaj kiam nin premas tristo kaj ni sentas bezonon “mallaŭtiĝi”, simple ni restadu antaŭ la Plejsankta Sakramento. Ni fordonu al Jesuo ĉiujn niajn problemojn, afliktojn kaj vundiĝojn. Ni permesu al Li, ke Li sanigadu nin, transformiĝadu, forigu de ni egoismon kaj instruu nin ami. ■

El Milujcie się! 4/2015

¹ *Aŝramo estas monaĥejo aŭ religia lernejo.*